

HERALDO

Eldono: Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.
Redakcio-Administracio: T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.
Heroldo aperis semajne antaŭ la milito; ĝi reaperos semajne, kiam eble.
Jarabono 1946: por Belgio 90 fl., Nederlando 5 gld., cetero 10 angl. ŝil.
Anoncoj: 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fl. 20.—, gld. 1.— ktp.

DE ESPERANTO

SENDEPENDA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 3 (1052)

FONDITA EN 1920 — 22-a JARKOLEKTO

I JULIO 1946

« Radio ankaŭ ŝanĝu la signalojn:
El ĝi parolu Hom!
Ne plu Serpento! »

Ses jarojn parolis el Radio la Serpento. Ses longajn jarojn estis malamo kaj malamikeco ĝiaj signaloj, mensogo kaj kalumnio ĝiaj argumentoj. Ses longajn jarojn ĝi elkraĉis venenon kaj galon, morton kaj pereon kontraŭ tremaŭskultanta la homaro. Jam tro longe tio daŭris.

Fine la Serpento estas sub la piedo. Signaloj ŝanĝiĝis. Homa voĉo resonas el la laŭtigilo.

Kaj ankaŭ Esperanto, longtempe silentigita, denove ekokupis sian rangon ĉe la Radio. Dum regadis milito, kaj malamo, kaj teroro, kaj sklaveco, por Esperanto — lingvo de paco, de amo, amikeco kaj frateco — ĉe ĝi ne estis loko. Nun nia lingvo triumfe rekonkeras unu pozicion post la alia. Jam ni denove povas ĉiuvespere aŭskulti la karajn sonojn kaj vortojn venantajn al ni per la ondoj eteraj. Unuavice staras ĉe tio la Ĉeĥa Radio.

Ni rigardu la Esperanto-Radio-Kalendaron, aŭskultu kaj... skribu al la radiostacioj, kiuj utiligas nian lingvon, ni skribu por kuraĝigi, instigi, konsili kaj, precipe, por danki.

VERDSTELAJ RADIOJ.

— La petskribo organizita de IEL rezultis ĝis 23.5. pli ol 35.000 subskribojn.

— IEL havis je la fino de aprilo 8951 membrojn, kontraŭ 4817 je la fino de aprilo 1945.

— La abonantaro de Herolda kreskis ĝis la 15-a de junio al 1051 en 33 landoj.

— La statistiko de Universala Ligo montras je la mezo de majo 1478 membrojn kaj 19042 brikojn.

— Pli ol 200 germanaj militkaptitoj en 20 kaptitejoj en Britujo komencis lerni Esperanton, laŭ la libro «Das leichte Esperanto». Laŭ la sama libro okazas kurso en norvega koncentrojo por aŭstraj militkaptitoj kaj civiluloj.

— Fine de marto okazis en konstruaĵo de la Universitato München (Germanujo) propagandkunveno por Esperanto, vizitata de 400 personoj, inter ili multaj alinacianoj.

— Laŭ «Pola Esperantisto» mortis dum la milito Lidia, Zofia kaj Adam Zamenhof, D-ro L. Rosenstock, Cs. Pruski, A. Hartman, M. Chmielinski, J. Sapiro, Prof. Odo Bujwid kaj multaj aliaj gesamideanoj, ĉu murditaj ĉu alimaniere.

— En sveda ĵurnalo «Ostgöten», 13.5., troviĝis artikolo «Matenaero por Esperanto-gazeto», pri la reapero de Heroldo.

— Sur usona militŝipo «Franklin Delano Roosevelt», la dua plej granda ŝipo en la mondo, estas juna esperantisto el Kalifornio, Bill Harmon, kiu intencas gvidi Esperanto-kurson surŝipe.

— Kristana Esperanto-Federacio en Svedujo ricevis el Nederlando 100 hiacintajn bulbojn kiel dankesprimon pro donacitaj paketoj kun vestoj kaj manĝaĵoj.

— En svedaj urboj Göteborg, Karlskoga, Skövde kaj Vimmerby la lernejoj aŭtoritataj komencis doni certan subtenon al Esperanto-infankursoj ekster la ordinara horplano.

— Usona leŭtenanto S. Simon faris paroladon okaze de propaganda kunveno por Esperanto en München (Germanujo), kie angla fraŭlino deklamis poemon de T. Jung.

— Sur brita ŝipo «Holm Sound» gvidis s-ro R.F. Latimer Esperanto-kurson por 17 personoj; el la ŝipo li korespondis kun esperantistoj en naŭ landoj.

— En Suda Amerika, precipe en Argentino, pli ol 2000 personoj lernas Esperanton per koresponda kurso.

NOVJORKO-LONDONO EN 9 HOROJ

En artikolo «La garantiantoj de nia venko» en la dua numero de la militeldono de Heroldo (15.3.1941) ni skribis interalie:

La progreso de la tekniko estas nehaltigebla. Ĝi daŭras eĉ dum la milito. Sed, se nuntempe estas la militaviadiloj kiuj kun rapideco de kvarcent, kvincent, sescent hor-kilometroj traŭtrancas la aeron portante morton kaj pereon al malamika lando, kaj antaŭ ili tremas en frostaj keloj la infanoj kaj virinoj, la maljunuloj kaj la invalidoj, — sed post ĉi tiu milito kun simila aŭ eĉ pli granda rapideco la trafik-aeroplanoj transflugos ĉiutage, eĉ ĉiuhore la kontinentojn kaj oceanojn: tiam de Amsterdamo aŭ Hamburgo ĝis Novjorko estos vojaĝo de mateno ĝis vespero, kaj de San-Francisko ĝis Tokio daŭros la plezuro nur kelkajn horojn pli longe. Kaj tiam alportos tiuj aviadiloj ne militistojn kaj ne bombojn eksplodemajn aŭ bruligajn al malamika lando, sed homojn-pasaĝerojn, komercistojn, sciencistojn aŭ turistojn, kaj ŝarĝojn sendanĝerajn kaj utilajn al najbaro proksima kaj malproksima, kun kiu oni vivos jam en paco. Tiam la manko de internacia interkomprenilo fariĝos ja urĝa kaj ĉiam pli urĝa problemo, kaj la enkonduko de la mondtrafika lingvo pli kaj pli altrudos sin. Estas eraro kredi aŭ esperi, ke en nia epoko de l' distancoŝrumpo, de l' miriametrojn manĝanta «oceanklipro», eĉ de la «fulmmilito» la triumfo de l' internacia lingvo povus esti daŭre malhelpata.

Oni ne bezonis esti profeto por antaŭvidi gigantan evoluon de la aertrafiko post la milito. Jam nun la grandaj kaj eĉ malgrandaj nacioj — Usono, Britujo sed ankaŭ Ruslando,

Nederlando, kaj aliaj — preparas sin por preni sian parton en tiu atendata giganta trafiko.

Provizore oni estas alikonstruanta jam pretajn militaviadilojn je flugmaŝinoj por pasaĝeroj kaj varŝarĝoj. Unu tia tipo estas la t.n. «Boeing Stratocruiser», alikonstruata el dum milita usona «Superfort», kiu sole en sia granda «salono» prezentas lokon por 59 pasaĝeroj; entute ĝi kapablas transporti 100 pasaĝerojn kun rapideco de 480 horkilometroj. Eritoj alikonstruas sian «Lancaster»-bombaviadilon je t.n. «Lancastrian», kiu kapablas kun rapideco de 450 horkilometroj traflugi distancon de 6400 kilometroj senhalte; ĝi transportas precipe poŝtaĵojn kaj, krome, dek pasaĝerojn.

Sed jam oni projektas flugmaŝinojn kun ankoraŭ multe pli granda kapacito, verajn flugantajn ŝipojn. Tiel ni legis ke amerika kompanio estas konstruanta tute novan aviadilegon nomatan «Vultee Clipper 37», kiu havas lokon por 204 pasaĝeroj kaj horrapidecon de 540 kilometroj, kiu do kapablas en nur 9 horoj traflugi la distancon de Novjorko al Londono.

La sama kompanio eĉ faras planojn por la konstruado de flugŝipo por 400 pasaĝeroj.

Estas verŝajne ke, jam post nelonge, ĉiutage transflugos po ok grandaj aviadiloj en ambaŭ direktoj la Atlantikon, kaj ke ĉiutage estos transportataj 600 pasaĝeroj.

Vere, en tiaj cirkonstancoj, kiam distancoj de monatoj ŝrumpas al tiuj de horoj (Kolumbo bezonis por sia unua vojaĝo al Ameriko pli ol du monatojn), la definitiva venko de l' internacia lingvo ne povas esti malproksima.

El Finnlando

«Ni iras kun espero renkonte al plilumiĝanta estonteco.»

Post la militfino la movado iom post iom komencis vigliĝi. Precipe la societoj apartenantaj al Finnlanda Laborista Esperanto-Asocio kunvenadis kaj aranĝis kursojn, dum la t.n. neŭtrala esperantistaro ankoraŭ ne sukcesis en simila grado vekli la intereson de la cerbolaboristoj de la lando, ankoraŭ envolvitaj en la nebulo de antaŭjuĝoj. *Promesplenaj signoj* tamen aperis ankaŭ en tiuj rondoj precipe nun, kiam oni kolektadis subskribojn por la deklaro adresata al UNO. Tiu kolektado nome sukcesis laŭ niaj cirkonstancoj tute kontentige: ĝis nun ni havas pli ol ses mil subskribojn, kio signifas 3 subskribojn el ĉiuj 2000 loĝantoj.

La komuna centro de la movado en Finnlando estas la Esperanto-Instituto de Finnlando (adreso: Töölöntullink. 7 A, Helsinki L). Ĝi aranĝis en somero 1945 kurson ĉefe por gvidantoj de Esperantaj kursoj en belega kampara loko Punkaharju, kie la «Libertempa Ligo» havas vilaĝon. Ĉeestis kiel eksterlanda instruisto s-ro Tiberio Morariu (nuntempe sveda civitano), konata kaj ŝatata profesia Esperanto-instruisto. Kiel aliaj instruistoj funkcias la direktoro de la Instituto, s-ro Vilho Setälä, s-ro K. Jokinen, staciestro H. Salokannel, instruisto S. Kivinen (kantado) kaj s-ino Tallberg-Vuoris (gimnastiko). La nombro de lernantoj estis 101, el kiuj 8 el Svedio. Por la uzo de la kursanaro la Instituto eldonis katalogon «Sonu, kanto, sonu!» kun kelkaj esperantistaj kantoj kaj tradukoj el la plej konataj finnaj kantoj. Nun estas preparata nova simila kurso somera por la nuna jaro en alia libertempa vilaĝo de la nomita ligo. Tie bedaŭrinde estas loko por nur 75 personoj, kaj certe la vilaĝo estos plena.

La finna ŝlosilo elĉerpigis en la fino de 1945. Nun aperis nova eldono, la 56-a ĝis

65-a milo. Se vi bezonas ĝin por enmeti en leterojn al finnaj neesperantistoj, vi povas mendi ĝin ĉe EIF por 1 respond-kupon. Prezo de la katalogo supre nomita 3 resp-kup. La valutaj limigoj tre malfaciligas al la finnaj samideanoj akiron de Esperanta literaturo; pro tio ni tre deziras interŝanĝadon kun allandaj eldonistoj. Krom la nomitaj verkoj ni povas proponi tradukojn el finna literaturo: Linnankoski, Batalo (60 p., 1 RK); Kivi, La fianĉigo (63 p., 2RK); Kivi, La botistoj (142 p., 2 RK) kaj legolibrojn: Esperanto-kurso (48 p., 2 RK); Esperanta Legolibro (112 p., 4 RK, bindita 7 RK). Se privataj samideanoj mendos la librojn, estas necese aldoni respond-kuponon por la sendkostoj por ĉiu libro (escepte de la ŝlosilo, kiu estas kalkulita kun sendelspezoj).

Por informi la gazetaron kaj la samideanaron pri la progresoj de la movado, la Instituto komencis eldoni multobligitan *Informilon*, kiu aperas laŭbezono, proksimume unu fojon en monato. Abono al serio de 10 numeroj kostas 5 RK.

Esperanto-kursoj okazis en la Laborista Instituto de Helsinki (30 komencantoj, 20 daŭrigantoj), en Lappeenranta (30 lernantoj), en Oulu (2 kursoj kun 100 lernantoj), en Multia (45 lernantoj).

Por finance subteni nian movadon, la Instituto aranĝas loterion kun 25.000 lotoj po 1 RK. Kiel gajnon ni disdonas kafon donace ricevitan de la svedaj samideanoj, k.a.

La gazetaro estas ankoraŭ grandparte apatia kontraŭ ni. Nur malfacile ni povas enpresigi artikolojn, kaj tio multe ĝenas nian agadon. Same la Radio. Ni intertraktis ree pri la afero, kun negativa rezulto.

Kontraŭe, la ŝtato iom subtenas nin. La jara subvencio al EIF certe preskaŭ nulliĝis: ĝi estas nuntempe 2600 mk., kio estas 260 respond-kuponoj. Sed por la someraj kursoj ni ricevis en 1945 la sumon de 10.000 mk., kaj nun 15.000 mk.

Sumo de ĉio: ni iras kun espero renkonte al plilumiĝanta estonteco.

La 7-an de septembro ĉiuj nederlandaj Esperantistoj al Utrecht!

Bonege sukcesis la paskaj kongresoj de laborista FLE en Alkmaar kaj de ĝenerala LEEN en Amsterdam. Nun la Nederlanda Centra Komitato Esperantista, kiu estas formita el reprezentantoj de la laborista, ĝenerala, katolika kaj kristana organizoj, projektas komunan kongreson de ĉiuj nederlandaj esperantistoj. Ĝi okazos la 7-an de septembro en Utrecht, en «Het N.V. -Huis», je 14-17 h. La salono havas iom pli ol mil sidlokojn; pli granda salono ne estis disponebla. Parolados 4 diverstendencaj oratoroj. Oni serĉas ankoraŭ eksterlandan, prefere anglan, parolanton. Vizitantoj frutempe havigu al si enirbileton de gld. 0.50. La komuna kongreso estos kvazaŭ enkonduko de la «verda monato», kaj se ĝi bone sukcesos, ĝi multe plifaciligos la propagandan laboron por la venonta aŭtuna kaj vintra sezono.

Utilaj estos kiel eble plej multaj salutleteroj kaj simpatiesprimoj el la tuta mondo, precipe de eminentaj profesoroj kaj aliaj eminentuloj en kaj ekster nia movado. Oni adresu ĉion al: *Nederlanda Esperanto-Kongreso, N.V.-Huis, Oude Gracht 245, Utrecht, Nederlando.*

Virinoj kaj Esperanto.

Rezolucio de Internacia Virina Ligo.

Kunveno de la Konsilantaro de Internacia Virina Ligo (WIL) akceptis, laŭ *The British Esperantist*, dum aprilo en Oxford la jenan rezolucion: «Konsiderante la vivan neceson de estonta kunlaborado inter la nacioj, kaj la lingvan malhelpon, kiu tiel evidente malfaciligis kaj malrapidigis la interkonsiliĝojn de UNO, ni en la Internacia Virina Ligo sugestas ke Esperanto, aŭ alia internacia lingvo, estu enkondukata en lernejoj kiel lernobjekto egalranga al aliaj lingvoj en ĉiuj landoj kiuj estas membroj de UNO.»

S-ino Roosevelt ricevis multajn sugestojn por Esperanto.

S-ino Roosevelt, kiu jam plurfoje okupis sin pri la temo de dua lingvo por ĉiu, apud la respektivaj gepatraj lingvoj, antaŭ nelonge skribis en *The Daily Telegraph*: «Unu el la plej gravaj helpoj por paco estas la adopto de unu lingvo, kiu estu instruata en ĉiu lernejo al ĉiu infano en la mondo... Multaj skribis al mi sugestante ke Esperanto estu tiu lingvo. Tio ŝajnas al mi iom nepraktika.» Se s-ino Roosevelt povus foje ĉeesti Universalan Esperanto-Kongreson, ŝi certe ŝanĝus sian opinion pri la «nepraktikeco» de Esperanto.

La opinio de Miss Wilkinson.

Brita parlamentano s-ro A. Lewis atentigis la britan instruministron, f-inon Wilkinson, pri la neceso de internacia lingvo, evidentiĝinta ĉe la dumilitaj konferencoj de l' estroj de la unuigitaj nacioj, ĉe la UNO-konferencoj kaj ĉe la Nurnberga proceso. Li demandis, ĉu ŝi konsideros prezenti al UNESKO la proponojn enkonduki Esperanton en la lernejoj, kaj ĉu ŝi konsideros enkonduki ĝin en la britaj lernejoj. F-ino Wilkinson respondis: «Mi ne dubas ke la pretendoj de Esperanto por esti agnoskata kiel internacia lingvo nepre estos prezentataj al UNESKO.»

Inventonte novan lingvon li estis atentigita pri Esperanto.

Tio okazis al nia egipta samideano Fahim Harfouche en Port Said, kiel ni legis en «La Egipta Esperantisto». En 1928, studante la francan lingvon, li observis la malfacilaĵojn de la gramatiko kaj de la neregulaj verboj. Jes, ĉiuj lingvoj estas tiel malfacilaj, sed kial oni ne kreu novan lingvon? Li neniam aŭdis pri Esperanto, tiutempe. Li komencis «organizati» novan lingvon. Li parolis kun amiko pri la afero. Tiu respondis: Kaj Esperanto? — Esperanto...? Kio estas Esperanto? La amiko respondis per elpreno de libro kaj invitis lin legi ĝin. S-ro Harfouche demandis, de kie la amiko havis la libron, kaj ĉi tiu informis lin pri kurso de la anglo (s-ro Cather). Tiuvespere li ĉeestis la grupon. Post nelonge li komprenis la lingvon kaj, entuziasme, skribis artikolon en araba gazeto. La respondoj nombris je centoj: el Kairo ili venis kaj el Aleksandrio, el Benha, Assuit, Fajum, Asŭan, Tahanoub, Gaza, Jaffa, Tel Aviv, Haifa, Jerusalemo, Damasko, Beyrouth, Basrah, Bagdad kaj el multaj aliaj lokoj. Bonsukcesa koresponda kurso estis la sekvo. Sed la nova lingvo internacia restis neinventita.

Oni imagu tion!

« Oni imagu tion: Ĉiu homo povu kompreni ĉiun alian homon en la mondo, tutegale de kie li venu! »

La ĉi-supraj vortoj devenas ne de esperantisto. Ili estis, mallonge antaŭ la milito, skribitaj de germana ĵurnalistoj kaj publikigitaj en naci-socialista ĵurnalo. Kompreneble, la skribinto intencis ilin ironiaj. Sed per ili esprimiĝas ankaŭ la teruro, kiun povis senti Hitlerano ĉe la nura penso ke kiu ajn homo en la mondo povus interkompreniĝi kun kiu ajn homo en alia lando. Tio estus ja alia revolucio! Kaj revolucio certe malsama ol tiu de la Munkenaj Bierkel-herooj. Ankaŭ ĝiaj konsekvencoj estus malsamaj. Anstataŭ atmosferon de malfido kaj miskonprenoj senfine, sole dum kiu povas prosperi mallumaj aspiroj de « superhomoj » kaj mondkonkeruloj, ĝi kreas reciprokajn komprenon kaj fidon, la antaŭkondiĉojn de tutmonda kullaboro kaj paco.

Mi ne miras ke la dorso de fanatika Hitlerano transkuris frosta tremo, kiam li bildigis al si tiujn konsekvencojn.

URTIKO.

Esperantistoj kongresis.

La nunjara Svisa Esperanto-Kongreso okazis de la 26-a de majo ĝis la 2-a de junio en St. Gallen. Pro la interesaj kursoj kaj prelegoj de s-ro Cseh el Hago la anaro kreskis de unu tago al alia. La 1-an de junio okazis ekzamenoj; ĉiuj 7 kandidatoj sukcesis. Pri « La horo de Hindujo » prelegis D-ro Privat, prezentante al ni unu plian fojon siajn ideojn de honesta politiko. Sub prezido de s-ro J. Gilliard, Neuveville, okazis fine la ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo kiu reelektis la saman komitaton. Deficito kovris bonkora samideano. Longan diskutadon kaŭzis la okazigo de la Universala Kongreso 1947 en Svislando. Malnovaj spertuloj vidas en la frua invito danĝerojn, pro financaj malfacilaĵoj. La entreprenema parto de la kunveno kredas ke dum jaro multo pliboniĝos, kaj ke brila kongreso povas altiri jam multajn gastojn. En harmonio kaj kuraĝeco finiĝis la bela kongreso.

La 26-an de majo okazis en Arras Nord-franca Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis reprezentantoj de 17 grupoj. Venis ankaŭ la maljuna sed ĉiam entuziasma samideano Deligny el St. Omer. Prezidanto de Nord-franca Federacio elektigis s-ro Philippe, vicprezidanto S. Stuit, ambaŭ en Arras, kaj sekretario P. Brunet, 12 rue du Rempart, Valenciennes.

Kie nia lingvo devis fariĝi
Napola dialekto.

Dek homoj sidas ĉirkaŭ granda tablo. Ili sidas sur benkoj. Unu demandas: Kiu estas mi? Alia respondas: Vi estas sinjoro V. — Kio estas mi? Vi estas instruisto. La lernantoj aŭskultas atente, dum la instruisto faras unu demandon post la alia. Kia estas mi? Vi estas maldika. Ili nun ridas. Sed jam venas nova demando: Kie estas mi? — En la ĉambro. Kie estas la ĉambro? La ĉambro estas en... Jes, ili ankoraŭ ne lernis la vorton «koncentrejo». Ĉar la leciono okazis en la malbonfama koncentrejo Amersfoort.

La S.D. (germana polico) kaptis min en novembro 1944, loĝigis min en la tre konata malliberejo en Scheveningen kaj transportis min post naŭ tagoj al Amersfoort. Tie mi renkontis la IEL-delegiton el Coevorden, s-ron Knol, dentiston. Ni interparolis kaj starigis Esperanto-kurson laŭ la Cseh-metodo.

Sed... Esperanto estis malpermesita lingvo. Orte oni demandis min, kiun lingvon mi instruas. Kaj mi ĉiam respondis: la italan. Sed unu el la samsortanoj diris: « Mi ja konas iom la italan lingvon, sed vian lingvaĉon mi ne komprenas. » — « Ho, » mi respondis, « tion mi ja kredas, ĉar mi instruas la Napolan dialekton! »

Tamen multaj sciis ke la lingvo estis Esperanto. Oni venis el alia barako kaj petis min instrui la lingvon. Sed baldaŭ oni avertis min, ke estas tro konate ke iu donas Esperantajn lecionojn. « Do, ĉesu, ĉar alie vi ne plu vidos la mondon ekster la koncentrejo! » Post kelkaj monatoj da laboro mi do devis ĉesigi ĝin. Sed mi scias, ke eĉ en la plej terura tempo de nia vivo Esperanto estis por ni nia sola apogilo.

H.V., Hago.

Esperanto helpas trovi
familianojn.

Lastan jaron mi povis fari servon al iu amiko, D-ro Kohen en Kajro, al kiu mi havigis informojn pri liaj du fratuloj loĝantaj en Parizo. Li pensis ke ili ne plu vivas, ĉar ili ne skribis de ses jaroj. La servon plenumis la sekretario de U.E.F. en Parizo. Antaŭ kelkaj monatoj nia pola samideano majoro Fiedoroviĉ, nun en Aleksandrio, petis min skribi al s-ino Wanda Zamenhof por peti ŝin, ĉu ŝi povos doni informojn pri iu familio de kelkaj el liaj konatoj en Varsovio. S-ino Zamenhof jam respondis kun bonaj novaĵoj kiuj kontentigis la konaton de nia samideano, kiu sendis al mi dankleteron, en kiu li diras ke li nun alie takas la gravan servon kiun donas Esperanto al la suferanta homaro. S-ino Zamenhof samtempe petis nin ke ni helpu reserĉi ŝian edzon D-ron Adamo Zamenhof kaj ankaŭ ŝian bofraton D-ron Henriko Minc, kiu eble troviĝas ie en Afriko. Ĉiuj samideanoj, kiuj povas havigi iajn informojn, estas petataj skribi al Egipta Esperanto-Asocio, poŝtkesto 450, Kajro.

T. MIGALLI.

LA UNUA MILO ATINGITA

900 abonantoj el 30 landoj estis la stato ĉe la apero de la dua numero, kaj nun la unua milo estas atingita. De nun Heroldo aperos jam regule ĉiumonate. Sed per tio ni ne kontentigos. Ni konscias ke Heroldo, nur monate aperanta, ne havas multan sencon. Sen pli altaj aspiroj, ĝi estus nur unu plia gazeto esperantista, kiu same bone povus neaperi. Tial nia unua zorgo estos, eldoni ĝin almenaŭ duonmonate, tiel baldaŭ kiel eble. Pli posta celo estos la *semajna* aperado, kaj la plimultigo de la paĝoj al 8, 10 aŭ 12. Sed antaŭ ol atingi tion, ni certe bezonos ankoraŭ iom da pacienca.

Adresu ekskluzive al Scheveningen!

Flandra Esperanto-Instituto en Bruselo (Belgujo), kiu jam eldonas alian gazeton, la « Flandran Esperantiston », grandformatan kaj bonege redaktitan, bonvolis preni sur sin ankaŭ la eldonadon de Heroldo, ĝis kiam ni mem ricevos eldonpermeson en Nederlando. Tamen bonvolu ĉion rilatantan al Heroldo adresi ekskluzive al: Heroldo de Esperanto (aŭ al: s-ro Teo Jung), Scheveningen, Nederlando. Se vi volas, vi povas aldoni la straton kaj domnumeron (Harsdenhoekweg 223) sed korespondantoj atingas nin ankaŭ sen indiko de la strato.

Manuskriptoj

alvenas jam abunde. Sed ne estas ĉiam tio kion ni bezonas. Ne utilas nun raportoj pri unuopaj kluboj aŭ kursoj, ne utilas detalegaj priskriboj, por kiuj nepre mankas la loko. Kiam Heroldo denove estos semajna gazeto kun 8-12 grandaj paĝoj, ankaŭ por tiaj raportoj denove estos loko pli facile disponebla.

Fotoj.

Bedaŭrinde ni tute ne ricevis taŭgajn fotojn; alie ni tre ŝatus publikigi « filmon », kiajn Heroldo ofte enhavis antaŭ la milito, t.e. serion da fotetoj, en ĉiu numero.

LA « VERDA INSULO »
eĉ pli verdiĝas.

Unua Irlanda Kongreso de Esperanto decidis refondon de Irlanda Esp. Asocio.

Je la 20-a kaj 21-a de aprilo okazis en Dublino nia Unua Kongreso de Esperanto. Dum la antaŭaj ses monatoj niaj samideanoj faris multe da propagando. Preskaŭ ne pasis semajno sen artikolo aŭ aludo pri nia afero en niaj tagĵurnaloj aŭ gazetaro. Tial estis saĝa decido okazigi la kongreson kaj refondi IEA, kiu dum la pasintaj kelkaj jaroj preskaŭ tute forvelkis.

Je la posttagmezo de la 20-a, s-ro O'hUginn, IEL-peranto, faris la malferman paroladon, kiu estis sekvata de interkonatiĝa horo kaj de bela ekspozicio de Esperantistoj. Post tetrinko komenciĝis la unua kunsido. Oni unuanime decidis refondi la malnovan asocion sur vigla bazo, kaj s-ro O'Cuirc donis resumon pri respondoj al cirkuleroj, antaŭe senditaj al ĉiuj konataj irlandaj esperantistoj, por peti ilian opinion pri la nova asocio. Sekvis diskuto pri la reguloj de la asocio.

Oni elektis provizoran komitaton, kies oficperiodo daŭros ĝis la unua ĝenerala kunveno de la membroj. Estro de la komitato: s-ro O'hUginn, sekretario: s-ro O'Cuirc (adr.: Ardan Maoilthuille, Béal Atha an Fheadha, Irlando), kasisto: s-ro O'Feargail.

Je la dua tago de la kongreso okazis ekskurso al la Powerscourt-bieno, kie antaŭ nelonge estis filmita la Batalo de Agincourt por la fama kolora filmo « Henry V », laŭ la verko de Shakespeare.

Post tetrinko en Dublino estis aliaj diskutoj kaj la ferma kunsido. En la fermaj paroladoj oni esprimis grandajn esperojn por la kresko de la movado en la « Verda Insulo », sendis salutojn al ĉiulandaj esperantistoj kaj esprimis elkoran simpatian kun tiuj samideanoj kaj iliaj familioj, kiuj suferis dum la ĵus pasinta terurega milito.

LIAM O'CUIRC,
sekretario de I.E.A.Prova referendumo en Francujo
rezultigis grandan plimulton por
Esperanto.

Service de Sondages et Statistiques estas privata instituto en Francujo, kreita dum la milito, por ekkoni la publikan opinion francan pri diversaj aktualaj demandoj, simila al tiaj institutoj en Usono. Ĝi metis antaŭ la publikon la jenan demandon: « Ĉu vi opinias dezirinde ke, en la lernejoj ĉiulandaj, estu devige instruata unu internacia lingvo laŭ la tipo de Esperanto? » El la respondoj ricevitaj estis 65 el cent por, 20 kontraŭ, kaj 15 indiferentaj. Oni asertas ke tiu ĉi referendumo respegulas sufiĉe fidele la opinion de la tuta franca popolo, kaj ke la erarebleco estas malpli ol 3%. Konklude: la publika opinio en Francujo estas tre favora al nia afero.

Ni funebros

— Profunde funebriĝis nin la forpaso de du konataj samideanoj-generaloj: ĉeĥa ĝeneralo Jan Rambousek, unu el la plej fervoraj amikoj de Heroldo, mortis jam la 1-an de decembro 1945 en České Budejovice, kaj la 15-an de aprilo mortis en Meksiko hispana ĝeneralo J. Mangada. Ankoraŭ en marto ni ricevis de s-ro Mangada leteron, en kiu li esprimis sian esperon « ke nia nacia problemo havos justan solvon », kaj en kiu pli li montris ankoraŭ vivan intereson por nia afero, por kiu li tiom laboris dum sia vivo.

Nia Enketo,

publikigita en la unua numero postmilita, ĝis nun liveris nur malmultan materialon. Evidente la samideanoj estas tro modestaj aŭ ĝenigemaj paroli pri siaj travivaĵoj. Sed ĉu oni ne povas raportoj pri la sortoj de tiuj kiuj jam ne vivas, kiuj donis sian vivon por la libereco aŭ kiuj eĉ pereis pro sia fideleco al Esperanto?

LA ABONPREZO DE HEROLDO

estas por 1946 egala al la MA-kotizo por IEL, kun escepto de Britujo kaj Francujo. En Britujo la abonprezo estas 10 ŝilingoj; en Francujo ĝi estas 180 frankoj.

Belgujo. Konforme al la ĝenerala redukto de la prezoj en Belgujo, la abonprezo de Heroldo de nun estas 90 fk. (anstataŭ 100).

Subtenantaj Abonantoj, t.e. abonantoj kiuj per speciala kotizo volas subteni nian entreprenon, pagas sumon egalan al MS-kotizo por IEL (en Britujo 25 ŝil., en Francujo 400 fk.).

Pagmaniero. Laŭ konsento de s-ro Goldsmith, la ĝen. sekretario de IEL, la ĉefdelegitoj povas akcepti la kotizojn por Heroldo, en tiuj landoj kie ne ekzistas alia pagebleco. Funkcias la jenaj poŝtekontoj sub la firmo « Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando »:

Bruselo 2044.04 — Kóbenhavn 49.62 — Stockholm 41.80.

Nederlandanoj pagu provizore per poŝtmandato aŭ per monbiletoj en registrita letero.

Ĝis la 5-a de junio aliĝis ankoraŭ la jenaj Subtenantaj Abonantoj, al kiuj ni esprimas nian koran dankon:

18. H. Boffejon, Wilrijk-Antwerpen.

19. T.J. Gueritte, Surbiton.

20. E. Mila, Drancy.

Ni recenzas.

Libro kiu meritis sian sukceson.

A.M. de Jong: *La perfido*. El nederlanda lingvo tradukis W.F. Kruit. — 245 p., 14 x 20 cm. Forte kartonita. Prezo gld. 2.90. Eldonis Libroservo F.L.E., Amsterdam.

Ne mirigis min la informo de la eldonejo ke « La perfido » jam elĉerpigis. Ĉi tiu libro posedas iun tute apartan ĉarmon kiu tuj dekomence venkas la leganton. La stranga amikeco de tre konscienca malgranda knabo, kreskanta en medio de primitive-vilaĝa katolika kredo, kun kvazaŭa eksterleĝulo, kiun ĉiu en la vilaĝo laŭeble evitas, eksmaristo kaj fifama ŝtelĉasisto Kruĉo, estas en ĝi per tiel majstra kapablo kaj en tiel kapta maniero priskribita, ke oni restas interesita tra la tuta libro ĝis la lastaj paĝoj. Cetere nur tiuj lastaj paĝoj alportas kun la tragedia fino la kulminon de la rakonto, kiam malgranda Merijntje nevole kaj sensuspekte fariĝis la perfidanto de sia granda kamarado kaj amiko.

Troviĝas multe da ĉarmaj partoj en la libro. Eĉ la konflikto en la edzeco de la verkisto Walter kaj la « kara Dipatrino » estas prezentata en tiel delikata maniero ke oni povas nur pardoneme deziri ke ĉi tiuj du esence noblaj homoj iam denove trovi la vojon unu al la alia.

La Esperanta lingvo estas tre bona. Oni diras ke la originalo enhavas multajn dialektaĵojn tre malfacile tradukeblajn. Tiom pli laŭdinda estas la lerteco, per kiu la tradukinto solvis sian taskon.

Sed estus utile, se la tradukinto estus klariginta en la antaŭparolo, kial li havas tiel senliman preferon por la *a-formoj* anstataŭ la *e-kaj-el-formoj*, t.e. por adjektivo anstataŭ adverbo, por *kia* anstataŭ *kiel*, — kaj se li estus avertinta ke li intencas konsekvence uzi antaŭ *kiam* anstataŭ *antaŭ ol*, kaj indikativon post *kvazaŭ*. Pro tio, ke li ne faris, oni stumblas ĉiumomente super tiuj nekutimaĵoj, el kiuj ekz. la adjektiva formo en la sekvanta frazo (p.40) certe estas erara: « Tion (t.e. tranĉi panon) faras la patrino de Merijntje multe pli bela. » La tradukinto povus argumenti ke speciala adverba finaĵo ne estas necesa ĉar ankaŭ la nederlanda kaj la germana lingvoj ilin ne havas. Sed en Esperanto la adverba finaĵo donas agrablan variecon al la lingvo. Variecon — kaj ofte pli facilan kompreneblecon — donas ankaŭ la uzo de « kiel » kaj « ol » en kazoj, kie iu aŭ alia povas opini ke resp. « kia » kaj « kiam » estas pli logikaj, kiel en la jena frazo (p.224), kiu preskaŭ ne estas komprenebla unuavele: « La holandano portis uniformon, kun ĉako, kia inversigita (renversita) sitelo, kaj sabro, kia ekzekutista glavo. » Anstataŭigite « kia » per « kiel », kaj la frazo fariĝas tuj komprenebla!

T.J.

Esperanto je servo de scienco.

Paul Neergaard: *Danish Species of Alternaria and Stemphylium*. Taxonomy, Parasitism, Economical Significance. *Kun resumo en Esperanto*. — 560 paĝoj. Eldonis Einar Munksgaard, Copenhagen, kaj Humphrey Milford, Oxford University Press, London, 1945, Thesis. Prezo 60.— dkr.

En Esperanto la titolo de tiu ĉi grava scienca disertacio devus teksti: « Danaj specoj de Alternaria kaj Stemphylium », t.e. du genroj de mikroskopaj fungoj, t.n. « fungoj imperfecti » (neperfektaj fungoj). Tiuj ĉi formas apartan fungosistemon kaj ampleksas la fungojn, kiuj reproduktas sin per neseksaj sporoj, kontraste al la perfektaj, seksaj sporfungoj, sur kiuj baziĝas la difinita fungosistemo. La disertacio estas ilustrita per multaj kliŝoj laŭ fotoj, desegnoj kaj diagramoj.

Pli ol fantazio.

DENOVE TRE REKOMENDINDA LIBRO
EL DANUJO.

Agnes Bøgh-Høgsted: *Pli ol fantazio*. Tradukita el la dana lingvo de C. Graversen. — 70 paĝoj kaj kovrilo, 14,5 x 21,5 cm. — 1946, Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. — Prezo dkr. 3.—; havebla por gld. 2.05 aŭ bfk. 35.— ĉe la Libroservo de Heroldo.

Senpretendaj nomas la eldonejo la kvin novelejn kiuj konsistigas tiun ĉi libron. Tiaj ili estas. Kaj tamen ili estas verkitaj en interesa maniero, kaj per bona observemo, tiel ke oni legas ilin kun plezuro. Eble ili estas iom sentimentalaj, sed multaj legantoj, kaj precipe legantinoj, tion ŝatas. La plej lerta estas la rakonto pri lektoro Simon Avning kaj la maljuna onklino kun la akcipitra nazo kaj la verdaj okuloj (« Nokta flutmuziko »), kiu « montras, kiom maltrafe diverskleraj homoj prijuĝas kunhomon, eĉ kiam ili kredas juĝi absolute juste ». La aŭtorino mem estas malnova esperantistino. Tio faras al ni ŝian libron eĉ pli valora.

Papero, prezo kaj lingvo estas tre bonaj. Mi do senhezite rekomendas tiun novan eldonadon de D.E.F.

Kelkaj rimarkigoj pri la lingvo. La tradukinto, simile kiel tiu de « La perfido », havas preferon por la uzo de la a-formo en lokoj, kie aliaj uzus la e-formon. Tio sonas strange en frazo kia: « Ŝi ordinare ricevas la objektojn iom malmultekostaj », sed rekte konfuziga tio fariĝas en la jena: « La apotekisto kaj lia tuta familio staris en noktaj vestoj en la verando diskutantaj (kiu? ĉu la vestoj?) la flutludadon. » Frapis min kelkaj aliaj strangaĵoj kaj eraretoj (ekz. « kio » anst. « kiu », kaj inverse). Sed mi pensas ke jam ne estas necese, en recenzo atentigi pri ĉiu bagatela devojiĝo de la kutima lingvujo aŭ eĉ pri bagatelaj eraretoj kiujn la leganto facile mem eltrovas kaj korektas por si.

T.J.

IEL-Jarlibro 1946. *Unua parto*. — 184 p., 11 x 15 cm. Ĝin ricevas ĉiu individua membro de IEL; adreso: Internacia Esperanto-Ligo, Herongate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. — La enhavo, kiel kutime, estas tre riĉa kaj varia. Plej grava, kompreneble, la adresaro de la delegitoj, entute 1609, el kiuj 855 delegitoj, 151 vicdelegitoj kaj 603 fakdelegitoj, en 45 landoj. Ĉiu esperantisto bezonas tiun ĉi jarlibron.

Revuo de revuoj.

Malgranda Revuo. Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Ludvika, Svedujo. Aperas kvaronjare. Prezo de ĉiu numero 1 sved. kr., eksterlande 3 resp. -kuponoj. — La titolo « Malgranda Revuo » estas tro modesta. Kvankam la formato ne estas granda (14,5 x 22 cm.), sed ĉiu numero ampleksas 32 paĝojn kaj kovrilon, kaj — kio estas pli grava — la enhavo montras la sincerajn klopodojn de la redaktoro starigi la revuon sur kiel eble plej altan kulturalan nivelon. Tiuj klopodoj certe meritas subtenon. — « M.R. » aperas nun en sia 4-a jaro. (Nederlandanoj kaj belgoj povas mendi ĵarabonon ĉe Heroldo, por resp. 3 gld. aŭ 50 fk.)

Pola Esperantisto. N-ro 1, majo 1946. Eldonas Asocio de Esperantistoj en Pollando, Rynek Gl. 34, Krakow, Polujo. — « Malrapide fluas la tagoj de germana teroro, sed venis fine la tago de liberiĝo. Kaj tuj ankoraŭ en ruinoj de daŭranta milito la travivintaj esperantistoj en Pollando komencis la agadon. »

ESPERANTO KAJ ŜAKO.

Jam en antaŭmilitaj jaroj multaj ŝakistoj interesigis pri Esperanto kaj uzis ĝin en sia korespondado kun eksterlandaj ŝakistoj. Dum kelkaj jaroj aperadis ankaŭ ŝakrubrikoj en diversaj Esperanto-gazetoj. Tiam ankaŭ sveda ŝaka revuo « Schackvärlden » enhavis dum kelkaj jaroj en ĉiu numero 1-2 paĝojn en Esperanto. Ĝia Esperanto-fako, gvidita de s-ro T. Lindberg, organizis en 1932 unuan korespondturniron de ŝakistoj-esperantistoj. Ĝi plene sukcesis kaj ĝin sekvis ankoraŭ du turniroj, sed la lasta ne estas finludita pro militeksplo. Tiuj turniroj partoprenis ŝakistoj-esperantistoj el naŭ landoj. Sed oni devas diri, ke krom Schackvärlden ne atentis nin iu oficiala ŝaka organizacio aŭ revuo.

Nun, danke al laboro de sveda samideano Erik Larsson el Traneberg, kiu estas turnirgvidanto de ICCA (The International Correspondence Chess Association = Int. Korespondŝaka Asocio), oni sukcesis starigi ĉe ICCA Esperanto-fakon. Tio estas grava sukceso, ĉar anoj de ICCA estas preskaŭ ĉiuj centraj ŝakaj organizacioj en la mondo.

ICCA organizas grandajn turnirojn (olimppladojn) kaj interlandajn luktojn. Ĝi aperigas monatan ciklostilitan bultenon, kiu nun ĉiam enhavas ankaŭ artikoleton en Esperanto.

La Esperanto-fako de ICCA preparas ankaŭ siajn korespondturnirojn. Unue oni startigos turnirojn de unuopuloj, poste ankaŭ olimpion (kun diverslandaj teamoj de po ses homoj). Turniroj de unuopuloj komenciĝos en somero. En ĉiu grupo estos sep ŝakistoj. Oni zorgos pri tio, ke en ĉiu grupo estu ŝakisto el minimume kvin landoj. Oni povas jam aliĝi al tiuj turniroj. La aliĝkoto estas 5 angl. ŝil.; oni pagos ĝin je invito, kiam estos eble sendi monon eksterlanden. Aliĝojn sendu aŭ al s-ro T. Lindberg, Prässebo, Svedujo, aŭ al turnirgvidanto de Esperanto-departamento, D-ro V. Faigl, Zlönice, Ĉeĥoslovakujo. Ni preparas ankaŭ publikigon de ŝaka terminaro. Esperantistoj-ŝakistoj, helpu nin kaj kunlaboru!

(Ĉiuj Esperanto-gazetoj estas petataj respondi.)

DANCANTOJ EN ARBARO

Sudmara rakonto

La viro kuŝanta ĉe la bazo de la palmarbo estas rigardanta trans la malgrandan senarbejon ĝis la rando de la arbaro. La nokto estas kvietaj kaj silenta. Ĉirkaŭ li estas mallumo pro amasego da palmoj, altaj alispecaj arbegoj, lianoj kaj konfuza cetera kreskajaro; sed la senarbejo antaŭ li estas brila pro la lumeco de plena luno pentranta lagon de lumo inter la dezerta arbaro.

Li sidis tie ne farante movon, ne tuŝate de la beleco de l' nokto. Silentis la arĝenta lageto de lunlumo en la verdnigra arbarego, la plej alta malproksima monto pli interne en la lando, la dolĉodora kreskajaro sur la senarbejo kaj la lumblua ĉielo, kun dormemaj steloj, super ĝi. Entute tio estis romantika sceno sur unu el la romantikaj insuloj de Fiĝio.

La viro estis alportita ĉi tien antaŭ proksimume unu horo, akompanate, kvazaŭ honora gasto, de trideko da malhelhaŭtaj figuroj, junaj plentfortaj homoj sen alia vesto sur si krom « lava-lava » ĉirkaŭ la talioj, kaj kun kronoj de krispaj haroj. Ili estis kondukintaj lin el la malproksima vilaĝo kelke da mejloj for, laŭ serpentuma vojeto, kiu komence estis malluma irejo inter altaj palmoj kaj poste, kie ĝi ekgrimpis al la monto, nur mallarĝa aperturo tra la verdaĵa abundo. Alveninte ĉe la senarbejo, ili estis demetintaj lin per taŭga ceremonio ĉe palmarbo. Tiu ĉi loko ebligis belan rigardon al la lunlumena senarbejo, kaj transe de ĝi, preskaŭ kvindek metrojn for, videbliĝis la eniro de la vojeto, kie ĝi entuneliĝis en la fantoman mallumon de la arbaro. Sen klariga vorto, la malhelbrunaj figuroj, grandegaj brilantaj fantomaj homfiguroj, estis foririntaj de li kaj ekmoviĝis unu post la alia, laŭ serpentumanta kaj barbara vico de marŝantoj, en tiun tunelon. Dum iom da tempo la viro aŭdis la frapantajn piedojn. Poste estis silento.

Sed la viro ne sentis sin romantike. Lia nomo estis Bill Brown, nomo kiu tute ne rilatas al romantiko sed kiu ankaŭ ne respondis pro lia netuŝateco. Li estis de kvar jaroj loĝanto de Fiĝio kaj estis alveninta ĉi tien kun dudek-ses aliaj rifuĝintoj el la nova punkolonio Sidneo en la jaro 1804. La foriro el tiu haveno por ŝtelita boato estis perfekte romantika ago, kia estis ankaŭ la alveno al Fiĝio, kie Bill Brown kaj lia amiko James Smith ekloĝis en vilaĝo ĉe la bordo de Rerwar-Rivero, sur la granda insulo Viti Levu. Tie, dank' al la prestiĝo, kiun al ili donis la pafiloj, ili vivis trankvile, nemanĝite kaj neofendite, — kio estas iom malsama al la sorto de aliaj blankuloj kiuj pro ŝippereo al-

bordiĝis al tiuj insuloj plenaj de kanibaloj en tiuj malproksimaj tagoj.

La tribo, ĉe kiu Bill Brown kaj James Smith loĝis, tre ŝatis posedi tiujn du palkolorajn fremdulojn, kun tiel mirigaj pafiloj, kiel kunbatalantojn en la intertribaj militoj, ŝajne nedisigblaj de tiaj barbaraj regionoj kiaj tiutempa Fiĝio kaj moderna Eŭropo. Kiel rezulto, la vivo estis tute facila kaj agrabla al la du rifuĝintoj. Dum kelkaj jaroj ili havis preskaŭ diktatorajn povojn, dank' al la respekto — alia nomo por « timo », kiun la pafiloj efikis. Tial ilia konduto rilate al la aninoj de la tribo estis longtempe rigardata tiel supraĵe, kiel alimaniere ĝi ne estus. Blinde ne atentemaj, ili vivis nezorgeme, senpripense, volupte, ne vidante la kaŝatan koleron de la tribanoj. Tio ĉi povus, eble, daŭri senfine..., se ankaŭ ilia provizo de municio estus senfina.

Sed iam alvenis la tago, kiam ili devis direkti neŝarĝitajn pafilojn al la malamikoj de la tribo, esperante miraklon. Nu, mirakloj ne estas ĉiutage frandaĵo de la sorto! La tribano, kiu estis bonveniginta ilin kaj ĝis tiam toleradis ilian ĉeeston, vidis kun strangaj mienoj ke la mirindaj pafiloj, anstataŭ eljeti bruajn mortigpafojn, restis silentaj. Kaj ne nur ili restis silentaj, sed ankaŭ la malamikoj antaŭ la batalantaj tribanoj restis vivantaj. Bill Brown kaj James Smith vidis tiam sian prestiĝon fali kvazaŭ tromatura kokoso. La tribanoj ne plu rigardis ilin kiel utilajn amikojn, ne plu rigardis ilin kiel estaĵojn timigajn kaj timindajn, kiel neatakeblajn duondiojn, kaj ili tuj decidis, ankaŭ ne plu konsideri ilin kiel konkurantojn kies ĉeesto devas esti pardonata.

Tio atingis la plej altan punkton, kiam la tribanoj eksciis pri rompo de tribleĝo neniel pardonebla, kiun estis farintaj la du blankaj kunloĝantoj. Evidente, en la afero estis implikita iu ino el la tribo, knabino tre juna. Kvankam ŝi kondutis laŭ tropika interkonsento, la leĝoj aplikendaj en tiaj okazoj estis tre rigoraj... precipe ĉar la magio de la pafiloj jam estis for. Jen kial la viroj de la tribo, kiuj antaŭe ne sinokupis pri la ofendoj, komencis tuj apliki la leĝon.

Bill Brown tute ne komprenis tion. Li nur sciis ke, kiam li estis atendanta la revenon de sia amiko post fiŝkaptado sur la rifo, li estis subite ĉirkaŭita de, eble, tridek batalistoj kaj alportita al la malproksima senarbejo en la arbaro kie, per tutĝusta ceremonio, ili demetis lin ĉe la palmarbo kaj lasis lin admiri la belecon de la nokto. Li ne moviĝis for de tiu loko, kvankam neniu ordonis al li

resti tie; tamen li ankoraŭ tie estis kiam, unu horon poste, denove aŭdiĝis la mallaŭta bruoj de nudaj piedoj frapantaj la molan teron. La sonoj alproksimiĝis, kaj el la verda tunelbuŝo ĉe la rando de la arbaro aperis la vico de malhelbrunaj figuroj, serpentumanta vico balanciĝanta kaj jetanta rebrilojn, pro la lunlumo, de sur la nudaj ŝultroj, brakoj kaj kruroj. Bill Brown, ankoraŭ ĉiam kuŝanta ĉe la palmarbo, rigardis kvazaŭ sorĉe fiksite.

La figuroj venis en la centron de la lunbrilumata senarbejo kaj formis rondon. Tiam la observanto ĉe la palmarbo rimarkis, ke estis tie, kune kun ili, palkolora ulo, vestita nur per malnova kanvasa pantaloneto. Estis James Smith, kiu subite eljetis aron da kriegoj supren flugantaj al la stelplena ĉielo. Ili faligis lin sur la teron en la mezo de la cirklo de malhelaj figuroj kaj tie ili submetis lin al ceremonio kiun la rigardanto sub la palmarbo jam konis kaj pro kiu li ne estis forlasinta, tiel pacience kuŝante, la unuan pozicion: ambaŭ brakoj kaj kruroj de la palkolora ulo estis rompataj. James Smith kuŝis tie, do, en la lumo, kiam la tribanoj komencis furioze saltetadi ĉirkaŭ li, dum li, sveninte, ankoraŭ ne rekonsciigis por plene valorigi la sekvantan dancon. Tio ne estis sovaĝa frenezdanco: estis stranga, vigla, malrapida, konstanta paŝado de tridek grandegaj viroj, en rondo, ĉiuj unu post la alia, kun la manoj sur la ŝultroj de la antaŭa, kaj ĉiu saltante ĉiam sur certa loko de la dancejo. La ritma falbruado de tiuj pezaj piedoj estis akompanata de koleraĵ gorgosonoj kiuj pli teruris la blankulon neaktive partoprenantan en tiu ĉi dancado, jam rekonscian, ol tiun ĉe la palmarbo kiu fikse plu rigardis la marŝadon.

Du horojn la malhelaj figuroj moviĝis malrapide ĉirkaŭen, neniam flankiĝante de la vojo, neniam variigante la paŝon, neniam ŝanĝante la tonon de la elgorĝaj akompanoj. Tiam la danco ĉesis. La bronzaĵ figuroj disigiĝis kvazaŭ en duoncirklo, kaj la kuŝanta korpo de James Smith aperis en la lunlumo klare videbla al Bill Brown, kiu ankoraŭ estis fikse rigardanta de ĉe la palmarbo. James Smith estis morta. La danco komence okazis ĉirkaŭ li; poste la direkto estis iom post iom ŝanĝita, ĝis la dancantoj komencis marŝi sur lia korpo. Tiam ĉiuj liaj ostoj estis rompigitaj unu post la alia, per sesdek piedoj daŭre marŝantaj.

Bill Brown tremegis. Du el la malhelaj figuroj venis antaŭen kaj trenis lin en la centron de la senarbejo. La gorgosonoj rekomenciĝis, dum la rondiranta vico de dancantoj malrapide alproksimiĝis al li.

C. C. IVES.

Frankston, Australio.

D-ro A. Mildwurf:

THOMAS MANN

(Fino.)

Kiam demokratio krakis en Germanujo, Mann estis hazarde en Svislando, kie li do restis. Poste, lia filino Erika savis en sufiĉe romantika maniero la valoran, ankoraŭ nefinitan manuskripton de lia Jozefo-romano el la Munkena domo gardata de naci-socialistoj. En ekzilo Mann daŭrigis la verkadon de sia biblia verko kaj finis ĝian trian parton « Jozefo en Egiptujo » en Küsnacht, apud la Zurika lago.

Tie li ricevis leteron de la dekanato de l' universitato Bonn, kiu informis lin, ke la fakultato retiris lian honoran doktoran gradon kaŭze de lia perdo de germana ŝtataneco. La respondo de Mann datita de 1-a de januaro 1937 estas unu el la plej famaj leteroj de la literaturo. Profeta estas la sekvanta citaĵo:

« Sed ve al la popolo kiu, ne sciante al kiu vojo sin turni, fine elserĉas sian vojon per adoro de milito, malamata de Dio kaj homo. Tia popolo perdiĝos. Ĝi estos tiel venkata, ke ĝi neniam reviviĝos denove. »

En 1938 li akceptis postenon kiel prelegisto ĉe Princeton-universitato en Usono. Por havi pli multe da tempo skribi la lastan libron de sia Jozefo-tetralogio: « Jozefo la provizisto », li retiriĝis en junio 1940. Admirante la majestan klimaton de Kalifornio kaj serenajn kvazaŭ-egiptajn ĉielon — la ĝustan atmosferon por fini sian grandan verkon de 2000 paĝoj —, Mann konstruigis al si domon sur la verdaj deklivoj apud Hollywood, kie li sentis sin sekura kaj komforta la unuan fojon, de kiam li forlasis sian malnovan hejmon en Munkeno.

Th. Mann speciale ŝatas la teatron, kaj havas ankaŭ por muziko pasian intereson, kiun li heredis de sia patrino kiu estis parte de kreola deveno. Mann ludas belege la fortepianon kaj violonon, li vizitas simfoniajn koncertojn kaj ŝatas aŭskulti gramofonon. Ĉi tiu muzika intereso postlasis sian signon je lia stilo kiel verkisto. Laŭ lia propra eldiro, muzikaj formoj instruis lin formi sian prozon.

En la nuna batalo por la okcidenta civilizo Th. Mann ludas dominantan rolon. Li deklaris ke « li pasigis sian vivon honeste kaj senripoze celante al la vero kaj bono ». Ĉi tiu plej karakteriza trajto de viro honorita de multaj kiel « la lasta granda Eŭropano » estis la ĉefa kaŭzo de lia verdirema opozicio kontraŭ naci-socialismo, de lia ekzilo kaj de lia rompo de ĉiuj ligiloj kun la lando de liaj praaĵoj.

De post lia alveno al Usono en 1938 Mann dediĉis sin senhezite al la anti-faŝista afero, rezignante « tiun danĝeran... kutimon de penso, kiu rigardas... vivon kaj intelekton, arton kaj politikon, kiel mondojn tute apartajn ». Li prelegis al multnombra aŭskultantaro tra la lando pri la temo de sia libro « La alveno de demokratio » (1938). Laŭ lia opinio, Usono estas klasika grundo de demokratio, la centro, al kiu forŝoviĝas la okcidenta kulturo por « la daŭro de la nuna eŭropa mallum-epoko ».

Ĉu vivas homoj sur Marso?

La demando pri la jes- aŭ ne-logateco de Marso estas alla el la grandaj misteroj de la homaro, krom tiuj pri Atlantiso, Lemurio, la Prahomo, la Pralingvo ktp. En la venonta numero ni publikigos artikolon pri la interesa temo: « Ĉu vivas homoj sur Marso? », pri projektoj por interkontakti kun Marsanoj, pri la ebleco de vivo sur la diversaj planedoj, kaj pri la sekreto de la Marsaj kanaloj.

RIDO SANIGAS

LIA OPINIO.

Demandis la instruisto: Kiel oni nomas homon kiu ĉiam nur parolas, tutegale ĉu tio jes aŭ ne interesas la aŭskultantojn?

Respondis Joĉjo: Mi dirus ke tio estas instruisto.

LA VORTO.

— Elizabeto, unu vorton de vi, kaj vi faros min feliĉa!
— Frenezulo!

POR ROMPI LA LANGON.

— Ĉu vi estis ĉe Cseh?
— Jes, mi estis ĉe Cseh ĉi-matene. Sed krome ĉeestis ĉe Cseh ĉeĉa Cseh-Instruisto.

Esperanto por Islamanoj!

De COLIN EVANS, B.A., D.B.E.A.,
Fakdelegito de IEL por Islamismo.

Tiom mi ĝojis, eksciinte ke reaperos Heroldo de Esperanto, ke, flamplena pro entuziasmo, mi tuj proponis al la redaktoro terure multnombrian aron da temoj por artikoloj — se li eldonus centpaĝan gazeton ĉiusemajne, mi plenigus ĝin! Li elektis tri el la proponitaj temoj; unu el ili estis: « Esperanto por Islamanoj ». Sed, eksebrilinte, mi demandas al mi: Kial pritrakti en Heroldo la utilon de Esperanto por miaj samreligianoj? Ĉar nur jam-esperantistoj, plejparte ne-islamanoj, legos tion. Pli utile estus pritrakti « Islamon por Esperantistoj ». Sed tiun duan temon mi jam pritraktis aliloke, kaj eble pritraktos iam estonte ĉi tie. Kaj la unua temo havas tiun utilon ke Heroldanoj ofte havas islamanaĵojn amikojn kaj najbarojn; precipe tiuj kiuj loĝas en Egiptujo, Hindujo, orienta Eŭropo aŭ en Palestino, se (estante esperantistoj) ili ne estas partianoj en la bedaŭrinda interrasa malpaco inter judoj kaj araboj tie. Kaj tiom granda estas la islamana tutmonda, ke certe indas la penon klarigi al islamanaĵoj najbaroj la apartan valoron de nia lingvo kaj movado por Islamo kaj islamanoj. Legu, do, nur se vi estas preta traduki kaj klarigi al ne-esperantistoj islamanaĵojn kiujn vi konas, aŭ en islamanaĵoj gazetoj!

Esperanto ne estas ĉefe praktika ilo por komercio kaj poŝtmark-interŝanĝo; ĝi estas praktika esprimo de difinita idealo, de sama idealo kiun Zamenhof provis ankaŭ, kaj pli malĉe, enkorpiĝi en la movado « Homaranismo ». Nu, tiu idealo estas precize tiu, kiu plej diferencigas Islamon de aliaj religioj: la unueco, familliteco, fratreco de la homaro tutmonda.

« Ni (Dio) faris vin gentoj kaj triboj por ke vi vin konu reciproke », diras la Korano

(Islama Biblio), ĉap.XLIX, verso 14. Laŭ islama kredo, nur unu simplan religion instruis ĉiuj inspiritaj genuloj religiaj, fondintoj kaj estroj de religiaj komunumoj, en ĉiuj nacioj. Pro nacia aparteco kaj dividiteco, homaj tradicioj poste koruptis aŭ misformis kaj disformis tiun instruon, tiel ke ĉiu gento diris: « Ni havas gentan religion kiu estas la sola vera, nia fondinto estas la sola sendito, profeto, « avatara », enkarniĝo, aŭ filo, de Dio. » Tion rekonas Paŭlo, dirante al la Korintanoj: « Estas inter vi malpaco, kaj la jenon mi volas diri: Ĉiu el vi diras: mi estas de Paŭlo, kaj mi de Apolo, kaj mi de Kefas, kaj mi de Kristo. » Bramanoj diras ke unu kasto estas pleje sankta kaj pastreca, kaj tiukastano malpurigas religie kontaktante kun alikastano; hebreoj, ke ilia aparteco kiel elektita gento, « nacio de pastroj kaj sankta popolo », estas esencaĵo de la juda religio. Kristanoj eble rekonas teorie la egalecon de ĉiuj homaj rasoj, sed praktike tiu teorio neniam, nenie, realiĝis aŭ efektiviĝis en Kristanujo. Usono havas apartajn preĝejojn kristanajn por blankuloj kaj nigruoj kaj malpermesas ke ili miksiĝu — eĉ por adori Dion! Kaj la protestantaj eklezioj malkaŝe estas naciaj tiom ke la brita reĝo devas esti anglikano, escepte kiam li vizitas Skotlandon: tiam li dumviziite farigas ano de la Presbitera Eklezio.

Tion islamanoj scias: ili estas islamanoj, ĉar ili kredas ke, post serlo da naciaj profetoj (Moseo, Jesuo, la greka Esopo, Budao ktp.), kiujn ĉiu islamano devas respekti egale, sen ia ajn diferenco aŭ distingo, kiel senditojn de Dio, Dio sendis Mahometon, kiu estas simple la plej lastatempa el ili, por re-revelaci saman revelacion lastafoje al mondo jam preta al Internacia Interkomunikado, tiel ke ne plu necesas apartajn naciajn profetojn. Ĉe islamanoj estas tute egalaj ĉiuj rasoj — blanka, nigra, flava, bruna. Egalaj ne nur teorie, ne nur en religiaj afe-

roj, sed efektive kaj vere en ĉiuj aferoj ordinaraĵ kaj civilaj de socia vivo. Ĉu ne estas, por la Esperanto-movado, utile klarigi al viaj amikoj islamanaĵoj, kiel precize tio estas la interna ideo de Esperanto? Citu al ili la vortojn de la majstro, en la « Deklaracio pri Homaranismo »: « Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikaĵojn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej gravaj malfeliĉoj, kiu... devas malaperi. »

Ni islamanoj rekonas la tutan liberecon mensan de ĉiu, dirante ke, se oni konfesas la unuecon de Dio kaj la Di-senditecon de ĉiuj religiestroj ĉiunaciaj, enkalkulante Mahometon simple egala kaj lastatempa inter ili, oni estas islamano, kaj neniu alia islamano rajtas trudi propran interpreton pri la revelaciita religio; kaj ke eĉ al nekredantoj oni tute ne rajtas trudi eĉ la veran religion. Montru, do, al viaj samreligianoj la himnon de Zamenhof « Preĝo sub la Verda Standardo » (dirante al ili ke Verdo, la islama koloro, estas ankaŭ la Esperanta): « Al vi ni ne venas kun kredo nacia, kun dogmoj de blinda fervoro! »

Kaj ne nur la idealoj kaj « Interna ideo » de Esperanto estas tiel precize la apartaj kaj esencaj ideoj de Islamo, ke helpante la Esperanto-movadon islamanoj helpas propagandi esence islamajn ideojn, eĉ sen la nomo de Islamo, kaj eĉ ĉe multaj kiuj ankoraŭ ne estas pretaj akcepti la profeton Mahometon, sed nia movado havas ankaŭ praktikan flankon, kiu speciale taŭgas al modernaj problemoj islamaj.

Pro la jam dirita diferenco inter Islamo kaj, ekzemple, Protestantismo, estas tre grave ke islamanoj ĉiulandaĵ estu tute kaj vere anoj de unu « popolo », de unu komunumo; estus esence mal-islame trakti iun ajn islamanon de iu ajn lando kiel « frem-

(Vidu pĝ. 4, kol. 1.)

PAROLAS LA LEGANTO

La literoj Q, W, X, Y.

La artikolo de D-ro Porto Carreiro Neto en n-ro 1 elvokis vigan eĥon. Kvar samideanoj sendis rimarkigojn pri ĝi. D-ro Nijveld el Amsterdam atentigas pri tio ke jam en la «Konsilaro por la Farado de la Sciencaj kaj Teknikaj Vortaroj» (Raporto el la kolekto de Int. Sciencia Revuo en 1911) oni trovas sur paĝoj 46 kaj 47 la prononcojn *kuo* por *q*, *kso* por *x*, *i greka* por *y* kaj *duobla vo* por *w*. Ankaŭ la aliaj respondintoj (T. Pendlebury, G. C. Jervis kaj Nils Utne) proponas *kuo* por *q* kaj *i greka*, *greka* i aŭ *igreko* por *y*, rezervante la nomon *ipsilo* por la greka litero tiunoma. S-ro Jervis opinias ke *kso* estus pli laŭregula ol *kso* (almenaŭ antaŭ vokalo, komparu: ekzemplo); la sama proponas *duvo* por (pli longa) *duobla vo*.

Por la grekaj literoj T. Pendlebury proponas la jenajn Esperantajn nomojn: alfo, beto, gammo, delto, epsilo, zito, ito, dito, joto, kappo, lambdo (aŭ: lamdo), muo, nuu, ksuo, omikro, puo, ruo, sigmo, tuo, ipsilo, fuo, huo, psuo, omego.

Interesa estas rimarkigo de D-ro Nijveld pri la monotoneco de la Esperantaj literoj citataj en kemiaj formuloj, t.e. de la fina sono -o de ĉiu litero: Pensu ekz. pri K4F6 (CN)6, laŭ nuna prononco «ko kvar fo e co no ses». Kion oni opinias pri la ideo, elparoli la literojn f, l, m, n, r, s (kaj eventuale x) laŭ naĉa kutimo ef, el, em ktp. ? Mi kredas ke ĉi tie la diversaj naĉaj lingvoj havas preskaŭ la saman prononcon, kontraŭe al la literoj, kiuj ne komenciĝas per e, kie ekzistas multaj diferencoj. La monotoneco de la formuloj estus lora rompita.

Ni aldonu ke ankaŭ nia redakcio foje publikigis proponon por malmonotonigi la Esperantan alfabeton: doni al la malmolaj (senvoĉaj) konsonantoj t, p, f, s ktp. la finaĵojn -o, al la molaj (voĉaj) d, b, v ktp. la finaĵojn -a, kaj al la ceteraj (m, n, r, l ktp.) la finaĵojn -e.

CU STALIN — ESPERANTISTO ?

Nian demandon en n-ro 1 respondis du samideanoj: s-ro Magel el Aalst-Waalre (Nederlando) kaj s-ro Caubel el Orléans (Francujo); jen la du respondoj:

Vi demandas: «Ĉu Stalin estas Esperantisto?» Pri tio mi legis en libro de Max van Pol («Jozef Stalin», paĝo 49): «En la kutimaj parolaĵoj en la malliberejo, kamarado Koba» (Stalin) neniam partoprenis; multajn tagojn li povis, kuŝante sur sia benklito, legi librojn de Marx kaj Lenin aŭ pristudadi Esperanton, ĉar en tiu tempo li ankoraŭ kredis je la oportuneco de internacia mondlingvo.»

Hispana gazeto «Mundo Gráfico», Madrid, 17.11.1937, skribis sub titolo «Cuando Stalin estuvo en la prisión» (Kiam Stalin troviĝis en la malliberejo: la lernado de Esperanto antaŭ la transporto al frosta Siberio — temis pri la malliberejo Bailoff en Baku): «Travis la horojn de tiu jaro 1908 la fariganta Stalin — kiun oni tiam familiare nomis Koba — inter tiu loĝantaro diversa kaj suferanta de la malliberejo. Li satis resti sola, inter la multo de la mallibereuloj. Nur de kamaradoj intimaj li satis kuneston, la plej amata estis Sakraredidze, flegma teorigo marksana de la malliberejo. Kun li kaj alia samkarcerano li dediĉis sin al lernado de Esperanto, kiun li konsideris la estonta lingvo de la Internacio.» Ne estas pliaj detaloj, sed la eliraĵo estas iom pli preciza ol la antaŭaj informoj. Fonto ne estas montrita.

LA ATOMBOMBO.

En la unua numero vi skribas ion pri la atombombo kaj la piramidoj, kio eble donas al homoj iom falsan imagon pri la efiko de atombombo, almenaŭ de ĝisnuna speco. La atombomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki speciale efikas kiel gigantaj fajrobomboj bruligantaj ĉion bruligeblan en granda distanco. Tamen ŝtonaj domomuroj sufiĉe bone rezistas. Krome la bombo agis per radio-aktiva radiado danĝera por homoj.

SALEX, Svedujo.

dulon». Islamanoj vojaĝantaj aŭ transloĝantaj, aŭ vizitantaj fremdlandon, kaj konvertitoj al la islama religio en landoj kie malmultaj estas islamanoj (kiel mi, angla islamano, kaj kreskanta nombro de modernaj okcidentlandanoj kiuj nuntempe islamaniĝas), bezonas nepre, por plenumi la esencan ideon de Islamo mem, la povon paroli kun samreligianoj, skribi al ili, ricevi novaĵojn kaj literaturon ĉiulande pri komunaj intereso.

Se la islamano diros (iuj tion diris al mi): «La Araba estas la Esperanto de Islamanoj!», estas du gravaj respondoj: 1. Ĉar la araba estas aparte islama lingvo, ĝi tute ne helpas en la urĝa devo religia de la islamano, propagandi siajn ideojn ĉe la ekstera mondo; 2. Eĉ por bonaj islamanoj de landoj, neparolantaj arabe, la araba estas multe tro malfacila por ordinara uzo pri ĉiutaga aferoj en konversacio kaj korespondado. Tio estas evidenta. Eĉ en moskeoj oni donas prelegojn kaj predikojn per aliaj naciaj lingvoj, pro tio; amaso da islama literaturo eldoniĝas en la urdua, la angla, franca, turka ktp. pro la sama kialo. Estas facile, en kelkaj semajnoj ellerni la arabajn preĝojn; multe malpli facile, lerni legi facile kaj komprenante la Koranon en la originalo arablingva, sed necese por nia religio; sed eĉ sukcesante tion fari, angla aŭ malaja aŭ sveda aŭ rusa aŭ ĉina islamano ne kapablus flue interparoli per la klasika araba idiomo pri ordinaraĵoj, por samfamilie miksiĝi kun samreligianoj ali-landaj.

«Kiam vi vidos la homaron amase eniri la religion de Dio,» diras la Korano, — kiam ni tion vidos, ĉu Islamo dividiĝos, simile al Protestantismo, en multajn landajn komunumojn? Tio estus precize la malo de la islama celo. Pli ol iu ajn alia «ismo», Islamismo bezonas Esperanton.

ENIGMO-KONKURSO

N-ro 3

Unue jen la solvo de la Labirint-enigmo el n-ro 1:

Horizontale: a 1. atombombo; b 2. Eva; b 6. avo; c 1. re; c 4. roz; c 8. de; d 2. tre; d 6. ink; e 1. mondŝtato; f 2. nur; f 6. alp; g 1. ge; g 4. kol; g 8. ad; h 2. abi; h 6. ilo; i 1. Esperanto.

Vertikale: 1 b. krimego; 2 a. te; 2 d. ton; 2 h. as; 3 b. vir; 3 f. urb; 4 a. mar; 4 d. edr; 4 g. kie; 5 a. bro; 5 f. kofr; 6 a. oaz; 6 d. ita; 6 g. lia; 7 b. vin; 7 f. lul; 8 a. bo; 8 d. ktp; 8 h. ot; 9 b. Heroldo.

Por pluraj vortoj eblis aliaj solvoj, ekzemple por lb. *krimaro*, *krimado*, *abomeno*, kvankam pri la korekto de la du lastaj povas esti dubo. Ni akceptis ĉiujn solvojn eblajn kaj atingis tiamaniere rezulton de 37 korektaj solvoj el 9 landoj. La loto decidis pri la disdono de la premioj jene:

1. L. Melotte, St. Denis, Francujo;
2. Rag. G. Tanzi, Milano, Italujo;
3. J.M. Baxter, Glasgow, Skotlando.

Unu samideano atentigas nin ke simila enigmo, kiel la de ni publikigita Labirint-enigmo, jam aperis en la 126-a konkurso de «La Praktiko» en julio 1935. Kaj nun ni vldis tian enigmon ankaŭ en freŝdata angla ĵurnalo. Fakto tamen estas, ke nia redaktoro elpensis tiajn enigmojn unuafoje antaŭ dudek jaroj en nacia lingvo kaj proponis ilin tiam al grava semajna ilustrita revuo; sed la redakcio de tiu revuo resendis ilin al ni; hazarde ni posedas ankoraŭ la leteron de la 2-a de novembro 1926, per kiu la redakcio akompanis la resendon.

Hodiaŭ ni publikigas unu problemon kaj unu nom-enigmon.

PROBLEMO

(proponita de s-ro P. Brunet, Valenciennes)

Vilaĝo V estas 35 kilometrojn distanco de urbo U. Iutage, matene, Felikso forlasis piede U por atingi V. En la sama momento Karlo foriras de V. al U. Ambaŭ marŝas po 5 km. ĉiuhore. Sed Felikso kunvenigas sian hundon kiu, tuj de la ekiro, kuregas renkonte al Karlo, atingas lin, revenas al Felikso, ktp. Post la renkontiĝo de la du piedirantoj, la hundo daŭrigas kuri de unu al la alia. Fine, kiam la celoj estas atingitaj, kiom da kilometroj trakis la hundo? Ni volas klarigi, ke la hundo kuris je rapideco de po 20 km. ĉiuhore.

NOM-ENIGMO.

TRUUS LICKNA-KOOI estas sinjorino kaj NICO KOSTMERGER, LEO H. TOSTI kaj RAOUL T. GITKRUIS estas ŝiaj konatoj. Kiujn profesiojn havas la kvar gekonatoj, kaj en kiu urbo ili loĝas? (La literoj de la nomoj indikas, aliviciĝite, la profesio; la komencliteroj de la profesioj, se ĝuste vicigite, indikas la urbon kie la gekonatoj loĝas.)

Solvaj de la hodiaŭaj problemoj kaj enigmoj atingu nian Redakcion ĝis la 31-a de julio. Oni skribu la solvon sur aparta folio aŭ sur poŝtkarto sen alia sciigo. Por la ĝusta solvo ni fiksas la jenajn premiojn:

1. Korolenko: La senlingvulo.
2. Aszlányi: Sep vangofrapoj.
3. Tolstoj: La morto de Danton.

Lingva Konsilaro.

D. — Ĉu oni skribu duoblajn prepoziciojn per du apartaj vortoj?

R. — Kvankam la demando ne tre gravas, estas tamen pli logike kaj preferinde, se oni skribas ilin aparte laŭ du vortoj; ekzemple: *de sur, de sub, de el, al en, al sur, el inter*, k.c. Oni plej ofte hezitas pri depost, ekde, denun; sed ankaŭ ĉi tiujn esprimojn oni skribu logike per du apartaj vortoj; nome: *de post, ek de, de nun*.

D. — Ĉu la adverbiaj esprimoj *tiel, nure, iome, tuje, tiame, nune* k.s. estas korektaj?

R. — Ĉi tiuj adverbiaj formoj ne estas malkorektaj; ili estas uzataj precipe en poezio, kie la pleonasma finaĵo -e intensigas la signifon de la simpla adverbo. Oni komparu: *tiel, tiel, tiamaniere; nun, nune, nuntempe*; kaj ankaŭ la formojn: *nurnure, tujtuj, simlajn al finfine, ververe, plenplene*.

D. — Ĉu *kontenta de* aŭ *kontenta pri*?

R. — La majstro plej ofte diras *kontenta de*: «Si estis malkontenta de si mem.» (Marta.) Sed iafaje li uzas ankaŭ *pri*: «Mi estas malkontenta pri mia edzigo.» (George Dandin.)

Esperanta Radio-Kalendaro.

La horindikoj estas laŭ GMT somera tempo aŭ MET normala tempo. Nederlando nun havas normalan MET. Ni ne povas garanti pri la korekto de la horindikoj; eventuale ni petas ĝustigon.

Ĉiutage:
20.00-20.30 Praha 49,92, ofte ankaŭ 1571 m
Dimanĉe:
19.10-19.20 Bern 47,28 m. D-ro E. Privat parolas alterne pri Int. Ruĝa Kruco kaj pri paco.

Lunde:
21.50-22.00 Praha 470 m.

Marde:
21.50-22.00 Mor. Ostrava 325,4 m.

Merkrede:
17.00-17.15 Sofia 352 m.

Ĵaŭde:
21.50-22.00 Praha 470 m.

Krome okazas regulaj dissendoj de WRJN, Racine (Wisconsin), Usono, de PRA 2 Rio de Janeiro, Brazilo, kaj PRI 3 Belo Horizonte, Brazilo.

Sveda Radio sendos Esperanto-programojn la 16.7. kaj 16.8., je 16.10 GMT somera tempo, ondo 19,80; ripeto de la programoj unu tagon poste je 2.10 nokte, per ondoj 25,63, 31,46 kaj 49,46.

Ekzamenu vin mem!

(Tiu ĉi rubriko estas destinita por via propra ekzamenu kaj distribo; ne sendu do viajn respondojn al nia redakcio. La ĝustajn respondojn vi povos trovi en la venonta numero.)

7. El kiuj lingvoj oni tradukis la jenajn verkojn: La Faraono; La Sankta Biblio; Vivo de Zamenhof; Tragedio de l' Homo; Sinjoro Tadeo.
8. Kiuj el la jenaj libroj estas originalaj: Mario kaj la grupo; Jarmiloj pasas; La vojo returne; La longa vojo; Stranga heredaĵo; La vivo de Nia Sinjoro Jesuo; Etiko; D-ro Dorner; Neĝa blovado.
9. Kiuj el la jenaj verkoj estas poezio: Sinjoro Tadeo; Streĉita kordo; Kandid; Bakŝiŝ; Mia spektro; La verda koro.
10. Kiuj estis la verkintoj de la nacilingvaj eldonoj de la sekvantaj libroj en la originalaj lingvoj: La strato de la Fiŝanta Kato, La Tragedio de l' Homo, Luno de Izrael, Marta, Hermano kaj Doroteo, Undino, La Perfldo.
11. Kiuj tradukis la sub 10 menciitajn verkojn en Esperanton?
12. Difino el Plena Vortaro: *Perŝtato*. Horizontala aŭ kurba surfaco, formanta la supran internan parton de ĉambro, galerio, kaj simile. (Anstataŭigu la x per la ĝustaj literoj.)

VATIKANAJ POSTMARKOJ

«KONCILIO DE TRENTO»

La serio konsistas el 14 valoroj, kies prezo estas:

5-10 serioj po 4 ŝilingoj
100 serioj po 3 ŝil. 6 p.

Oni akceptas interŝange kompletajn seriojn de neuzitaj, laŭeble memorigaj poŝtmarkoj de ĉiuj landoj, laŭ la oficiala kurzo: 1 sterlingfundo = 4 dolaroj = 400 liroj.

Oni liveras uzitajn poŝtmarkojn de Italujo, Vatikano kaj S. Marino je la subaj prezoj:

kovertoj kun 50 malsamaj pm. po 3 ŝil.
100 malsamaj pm. po 8 ŝil.
150 malsamaj pm. po 1 sterl.

Perantoj estas dezirataj ĉiulande. Turnu vin al

ESPERANTA KOMERCA ASOCIO
Filatela Fako, Dir. Arturo Martellotta,
GROTTAFERRATA (Roma), Italujo.

I. D. I. P.

INTERŜANGEJO DE ITALAJ POSTMARKOJ

IDIP interŝange italajn kaj vaticanajn poŝtmarkojn ankaŭ grandkvante kun neuzitaj gumbavaj aliandaj je nominala valoro, kondiĉe ke ili estas en kompletaj serioj. Interŝangejo la oficiala:

1 sterlingfundo = 4 dolaroj = 400 liroj.

Por mendoj (ne interŝangejo!) estas postulataj antaŭpago kaj nur 5% procentaĵo kaj poŝtkostoj. Noveldona serio.

Skribu per rekomenditaj leteroj filatele aŭ frankitaj.

Adreso: I.D.I.P. Lattanzi, Via Casilina 5, Roma (Italujo).

ANONCETOJ

Naskiĝo. Al ges-roj M. Moindrot, delegito de IEL, Domery apud Rians (Cher), Francujo, naskiĝis filo nomita Jean-Bernard. — Koran gratulon!

Naskiĝis Simonino, filino de ges-roj L. Melotte, del. de IEL, St. Denis (Seine), Francujo. — Ni kore gratulas.

Naskiĝis filino, nomita Ingrid, al ges-anoj F. Roose-De Kersgieter, Brugge, Belgujo. — Nian koran gratulon!

D-ro F. J. Belinfante, kiu transloĝis en 1936 de Den Haag al Leiden, salutas siajn iamajn korespondantojn kaj sciigas, ke li forlasis Nederlando kun edzino kaj tri infanoj en la komenco de julio 1946. Estonta adreso: Dept. of Physics, University of British Columbia, Vancouver (B.C.), Kanada.

La Internacia Katolika Informejo, sekretario: Fr. M. Monulfus, Loonopzand, Nederlando, senpago donas informojn pri la katolika religio al nekatolikoj.

Komercistoj kaj firmoj dezirantaj havi komercajn rilatojn kun **Egiptujo** (ekspedo kaj importo de diversaj varoj) estas petataj tuj skribi al D-ro Tadros Megalli, ĉefdelegito de IEL, P. Box 450, Kairo, Egiptujo.

Katolika Esperanto-Uniigo en Hago okazigos sian unuan postmilitan Letervesperon dum septembro 1946. Por sukcesigi ĝin, ni petas leterojn, poŝtkartojn k.a. el ĉiuj mondpartoj. Ni tutcerte respondos. Skribu al la sekretario: S-ro K.J. Vernooij, Viferboomstraat 234, Den Haag, Nederlando.

Letervespero. Sendu bildkartojn kaj leterojn! Oni bezonas gekorespondantojn por la gellernantoj: Esperanto-Kurso, rue du Corbillon, Saint-Denis (Seine), Francujo.

Instruistino deziras, ke oni sendu leterojn, bildojn kaj aliajn naciajn interesoĵojn, por geografiaj lecionoj al gedekjaruloj neesperantistaj. Adreso al kursanoj, p.a. M. Verda, 14 Leopold Street, Leeds 7, Anglujo. Ĉio respondota.

S-ro ĝardenisto H. Olesen, 27-jara, Hjalmarŝvej 5, Charlottenlund, Danlando, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo.

Korespondon per ilustritaj poŝtkartoj esperante, angle kaj france deziras R. Petri, Järnvägshotellet, Krylbo, Svedujo. Mi certe respondos.

Deziras korespondi kaj interŝangi poŝtmarkojn kun tutmondaj geesperantistoj. Ne pre respondos. D-ro Mario Bonino, Via Saccarelli 31, Torino, Italujo.

Deziras korespondi kun ĉiulandaj intelektuloj Prof. G. Vassio, Corso Giulio Cesare 118, Torino, Italujo.

Mi deziras interŝangi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Sendu markojn kaj vi ricevos la saman kvanton. Rud. Demuth, Kalendeg. 29 b, Malmö, Svedujo.

Fraŭlino kaj du geedzaj paroj deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al instruistino Ingeborg Pedersen, Munkebjergvej 68, Odense, Danlando.

Propagandecle mi kolektas Esperanto-gazetojn, revuojn kaj ĉiajn objektojn, per kiuj mi povas montri, ke Esperanto vivas. Mi certe skribe dankos al ĉiu. Adreso: S-ro H. Oosthoek, Poŝtkesto 5005, Rotterdam, Nederlando.

Anglujo. S-ro Collier, 14 Warren Hill Road, Birmingham 22C, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondi kaj interŝangi poŝtkartojn ilustritajn kun la poŝtmarko bildflanke P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Hago, Nederlando. Aŭfranku filatele, mi ĉiam recipokos.

Deziras korespondi tutmonde, interŝangi bildkartojn, poŝtmarkojn, leterojn ktp. Respondas tutcerte. S-ro B. Luiting, Alb. Thymplein 45, Hago, Nederlando.

Internaciaj feriaj Esp. kursoj en Danlando.

Hadsten: 13-20 julio kaj 20-27 julio.

Helsingor: 28 julio - 4 aŭgusto.

Kostoj: 56.— kr., 63.— kr. aŭ 75.— kr.

(laŭ loko kaj ĉambro).

Bonega kaj abunda manĝaĵo.

Petu prospekton ĉe:

L. FRIIS
Ingenmansvej 9
AABYHOJ, Danl.

Libroj livereblaj el nia provizo

(Vidu ankaŭ la anoncon en la pasinta numero!)

Adi: <i>La forto de l' vero</i>	1.75
Aszlányi (Spierer): <i>Sep vangofrapoj</i>	1.90
Bögh-Högsted (Graversen): <i>Pli ol fantazio</i>	2.05
Bulthuis: <i>Inferio</i> . Originala romano, bindita	2.90
Chesterton (Bean): <i>La aventuroj de Pastro Brown</i> , bindita	2.80
Egerrup: <i>D-ro Dorner</i> . Originala romano	4.35
Hasse Z. (Szlágyi): <i>Humora novelaro</i>	1.80
Ivans (Versteeg): <i>La viro el Francujo</i> . Kriminala romano, bindita	2.80
Korolenko (Sidlovskaja): <i>La senlingvulo</i> . Romano, bindita	2.90
Lagerlöf (Engholm): <i>Gösta Berling</i> , bindita	5.85
Lagerlöf (Frode): <i>La infanoj de Betlehem</i>	0.70
Norway (Severn): <i>La aventuroj de Marteno Drake</i> , bindita	2.80
Phillips Oppenheim (Wadham): <i>Riĉa kaj sen mono</i> . Romano, bindita	2.80
Schreiner (Andrew): <i>Romano pri afrika bieno</i> , broŝ	1.60
Schreiner (Andrew): <i>Undino</i> . Romano, bindita	2.80

Sinclair (Bailey): <i>Petrolo I kaj II</i> , kune	5.60
Sveda Antologio I kaj II, bindita	7.60
Szlágyi: <i>Dua Rapsodio</i>	1.60
Szlágyi: <i>Tria Rapsodio</i>	1.60
Szlágyi: <i>La granda aventuro</i> . Noveloj, bd.	5.55

Bernadotte (Engholm): <i>La fino</i>	2.10
Fisher (Gueritte): <i>Infanoj kaj patriroj</i>	2.80
Privat: <i>Vivo de Zamenhof</i> . Dua eldono, kun 12 ilustraĵoj, bindita	2.80
Wates (Bailey): <i>De tutmonda perforto al tutmonda frateco</i> , bindita	2.20
Wates (Bailey): <i>Progresado kaj la pasinteco</i> , bd.	2.20

La prezoj estas en guldenoj. Por sendkostoj aldonu 5%; ĉe mendo por minimume 5.— gld. ni liveras, ne kalkulante sendkostojn. Provizore ni povas liveri la supre citiajn librojn nur al Nederlando kaj Belgujo. Aliandanoj mendu ĉe sialandaj Esperanto-librejoj.

Libro-Servo de HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando